



La Blanka Rozo

Revuo de la
**FEDERACIO ESPERANTISTA DE
YORKSHIRE KAJ HUMBERSIDE**



N-ro 275

AŬTUNO 2016

PAŬLO GUBBINS FORPASIS

Ŝokis la britan Esperantistaron la subita kaj neatendita morto de Paŭlo Gubbins. Aparte trafita estis la semajnfina *Somerlernejo* en Barlastono. Bonŝance ensaltis lastmomente, kvazaŭ paraŝute, Malcolm Jones el Skipton, kiu sukcesis transpreni la detalan programon de Paŭlo kaj per tio gvidi la grupon de progresintoj. Do la Somerlernejo antaŭeniris pli-malpli laŭprograme. Ĉi-jare, pro la alta kosto, ne eblis uzi Shallowford Hall, do ni kuniĝis en la biblioteko kaj librovendejo de la Esperanto-Centro. Antaŭe mi dubis, ĉu estos sufiĉe da spaco, tamen ne estas problemo, danke al la toleremo de Viv O'Dunne kaj koleginoj.

La sep homoj en mia grupo de progresantoj estis al mi tute nekonataj. Ili malkaŝis sin esti tute malsimilaj unu al la alia, sed ili vigle kaj entuziasme kunstudis. Krome ĉiuj estis inter la aĝoj de 25 kaj 45 jaroj. Novaj kaj pli junaj vizaĝoj ĉiuflanke - bona aŭguro por la Somerlernejo kaj por la internacia lingvo ĝenerale.

Partoprenintoj ne pagis kotizon, sed tranoktis en hoteloj. Ni lunĉis ĉe la Esperanto-Centro kaj vespermanĝis en vilaĝa trinkejo apud la kanalo, do eblis daŭre konversacii en Esperanto ankaŭ ekster la klasĉambro. Tiel restis la celata etoso de la evento, nome ke oni sentu sin en portempa esperantlingva 'landeto,' kie oni uzas la lingvon konsekvence. Iomete mankis al mi la kromaj programeroj, por kiuj ne plu estas tempo: promenoj, ekskursoj, tabul-ludoj kaj muziko. Tamen laŭ mi la Somerlernejo restas rekomendinda al ĉiuj,

kiuj volas plibonigi sian regon de la parolata lingvo kaj pli profunde esplori ĝin surpaĝe aŭ surekrane.

Jack Warren

PAUL GUBBINS †

Kun granda bedaŭro ni notas la forpason de Paul Gubbins, pace kaj dumdorme en sia hejmo, je sabato la 6a de aŭgusto.

Paŭlo naskiĝis en Southport en 1949. Li studis la germanan ĉe la Universitato de Manĉestro kaj poste ĉe Queens University, Kanado, kie li doktoriĝis kun disertacio pri germana literaturo. Estinte instruisto kaj ĵurnalisto, li poste prelegis pri ĵurnalismo ĉe la Universitato de Staffordshire.

Paul esperantiĝis en 1984 kaj ekde tiam regule ĉeestis E-eventojn en Britio kaj eksterlande. Li verkis teatraĵojn kaj lernolibrojn, instruis ĉe la Somerlernejo ekde 1993, deĵoris kiel redaktoro de *Monato* kaj de *La Brita Esperantisto* (samtempe!) kaj kiel prezidanto de EAB. Krom tio li iel trovis la tempon konstrui modelfervojon en la ĝardeno de sia hejmo.

Tiom aktiva homo ege mankos diversloke en Esperantujo. Persone mi ankaŭ multon ŝuldas al li, ĉar lia instigado kuraĝigis min prelegi kaj verki en la lingvo.

Okazis memorceremonio en Mossley Village Hall je la 19a de aŭgusto. Inter la 200 ĉeestantoj estis 12 Esperantistoj. Tim Owen parolis pri la signifo de la lingvo en la vivo de Paul.

Ni kondolencas edzinon Anne kaj familianojn.

Jack Warren

SKOTA KONGRESO

Ĉi-jare mi denove ĉeestis la Skotan Kongreson; tiu fariĝis mia kutimo post emeritiĝo. Ĝi okazis en antaŭurbo de suda Glasgovo nomata Pollokshaws. La kongresejo estis tre oportuna por alveno per vagonaro ĉar ĝi estis iam parto de fervoja konstruaĵaro, kiun, post periodo de neglekto kaj kadukiĝo, oni transformis en belan kunvenejon por la loka komunumo kun kuirejo kaj necesejoj.

Vendredon vespere, post komuna manĝo kaj "interkonaj ludoj" organizitaj de Duncan Thomson ni aŭdis prelegon de la gastparolanto el Francujo - Cyrille Hurstel kiu parolis pri la problemoj de interpretado. Sabaton matene li denove alparolis nin kaj kuraĝigis nin laboradi por nia afero malgraŭ ŝajnaj obstakloj. Post kafpaŭzo Ed Robertson parolis al ni pri la vivo de John MacLean, Clydeside-a maldekstra politikisto en la fruaj jaroj de la dudeka jarcento.

Posttagmeze ni estis liberaj kja la plimulto el ni prenis la okazon aliĝi al la grupo kiu vizitis la apudan Pollok Park, meze de kiu situas Pollok House. Ĝi estas belega domo kiun nun prizorgas "Scottish National Trust" kaj havas bonegan kolekton da meblaro, bildoj, porcelano kaj skulptaĵoj kun kafejo. Tuj apude troviĝas la fama "Burrell Collection" de ĉiaspecaj artaĵoj kaj valoraĵoj en tia granda skalo ke oni apenaŭ povas ensorbi ĉion - certe alia vizito estas bezonata. Poste ni ĝuis komunan manĝon en apuda restoracio.

Dimanĉon matene Hugh Reid parolis pri alternativa impostsistemo, kiu elvokis inteligentan diskuton poste. Sekvis kafpaŭzo kaj poste ni ĝuis komunan kvizon kiun organizis Duncan. Post tagmanĝo surloke sekvis la jarkunveno kaj post tio estis simpla tamen digna Diservo, kiun kondukis David kaj Jean Bisset.

Entute tre ĝuinda semajnfino. Mi forte rekomendas ke vi ĉeestu la venontan Skotan Kongreson en Edinburgo en Majo 2017, ĉar ĝi estos kombinita kun la Brita Kongreso.

Geoffrey_Wood

FEDERACIA EKSKURSO AL FERVOJA MUZEO

Por la dua fojo nia somera kunveno kon-sistis el ekskurso aliloke en York. Ok homoj vizitis la Fervojan Muzeon, inkluz-ive de Sheila Henderson, kiu faris la longan vojaĝon el Glasgovo. Nuntempe ĉio dependas de la interreto, antaŭe oni same dependis de la fervoja reto. Tion indikas la atento pri detaloj - vidu la citaĵo sur paĝo 5.

Gudrulo

NOEF-KUNVENO EN ĈESTRO

Brilis la suno kiam ni ariĝis ekster la stacidomo meze de la urbo por partopreni la kunvenon de la nordorienta federacio. Peeter Aitai kondukis nin laŭ M. C. Escher-simila sinsekvo de laŭakvaj ŝtuparoj, supren kaj malsupren, por atingi restoracion kie ni bone manĝis. Sekvis prelego far S-ro Aitai pri diversaj ŝipoj kaj boatoj kiuj portis la nomon "Esperanto."

Poste restis sufiĉe da tempo por viziti la urba muzeo, kie abundas informoj kaj elmontroj pri la romia Ĉestro.

Sproto



Ĝefĉjo Wood admiras la pentraĵojn en la muzeo. Foto: Peeter Aitai.

FEDERACIA BIBLIOTEKO - FINA ĈAPITRO

Jen la lasta ĉapitro en la historio de nia biblioteko. Bedaŭrinde mi ne povas skribi pri ĝia antaŭa historio, kiu etendiĝas pasintecen longe antaŭ mia epoko!

Multaj el vi, kiel mi, memoras kiam Bruno Najbaro fidele prizorgis ĝin kun zorgo kaj amo dum multaj jaroj. Pro lia maljuniĝo la tiam juna kaj malortodoksa grupeto en Wakefield sub gvido de Rona La Belulo prizorgis ĝin en sia ampleksa domo. Ili elspezis multe da tempo en transportado, malpakado, surbretarigado kaj klasifikado de la libroj tiel ke ĝi fariĝis vera biblioteko, alirebla kaj vizitebla (kaj vizitinda), kaj federacianoj kaj aliaj bone profitis el tio. Tamen ĉiuj bonaj aferoj iam finiĝas, kaj estis tiel kun nia biblioteko kiam la grupo transloĝiĝis al pli malgranda domo kiu ne havis sufiĉe da spaco por ĝi.

Bonŝance Tony Eddison el York fariĝis nia savanto. Li posedis malplenan neuzitan domon en York kie ni povis reteni la kolekton en unu loko ĝis ni trovos ĉiaman hejmon por ĝi. La biblioteko ne estis uzebla ĉar ĝi estis libraro en aro da skatoloj, tamen ĝi estis samloka, sekura kaj seka.

Jaroj preterpasis ĝis la komitato decidis serĉi pli kontentigan solvon. Ne estos reala sanĉo ke oni iam povos revivigi ĝin tiel ke ĝi alireblus por vizitantoj aŭ perpoŝtaj prunteprenantoj. Do ni decidis peti la EAB-bibliotekon akcepti ĝin por aldoni al kaj plibonigi la nacian kolekton. Geoffrey King, la tiama bibliotekisto indikis sian subtenon de la ideo.

Tamen la afero ne estis tiel simpla. Tony ne volis fordoni "siajn" librojn kaj metis multajn obstaklojn antaŭ niaj provoj. Finfine li tiel malsaniĝis, ke ne eblis pritrakti aferojn kun li kaj li ofte estis nekontaktelebla telefone. Tony mortis 22an de marto kaj mi tuj kontaktis lian fraton, kiu prizorgis liajn aferojn. Alan estis afabla kaj helpema kaj evidente volis kunlabori por liberiĝi de la libraro por ke li povu utiligi la domon por luo aŭ vendo. Ni plene diskutis kaj planis la aferon ĉe la funebro de Tony.

Bonŝance Alan havis kamioneton kaj volonte liveris la librojn al Barlaston. Mi varbis amikon kun aŭtomobilo por helpi malpaki (Alan mem enkamionetigis ilin) kaj transporti la aldonajn librojn por kiuj ne estis spaco. Feliĉe tiu sufiĉis por ĉiuj libroj plus diversaj esperantaĵoj. Des pli bone, ĉar Alan vojaĝis la antaŭan tagon kun sia edzino kaj tranoktis apude ĉe parencoj. Mi kun mia amiko vojaĝis aparte en lia aŭto kaj ni ĉiuj renkontiĝis lundon 16an de majo ĉe la EAB oficejo en Barlaston, kie Tim Owen bonvenigis nin. Alan alvenis kun helpanto, do estis entute kvin el ni kaj per ĉareto ni rapide faris la laboron. Do, jen la fina ĉapitro en la vivo de nia biblioteko.

Poste ni iris al la apuda trinkejo "Plume of Feathers" kie Tim afable gastigis nin al lunĉo kaj glasoj da biero. Alan malavare rifuzis akcepti pagon pro siaj vojaĝ-elspezoj. Tamen mi pagis tiujn de mia amiko, nur £22.72 - bona kosto por transporti tiom da libroj tiom da distanco!

POSTSKRIBO

Mi faris pluan viziton al Barlaston kun aŭtomobilhava amiko 23an de aŭgusto kiam ni liveris la Esperanto-libraron kun aliaj esperantaĵoj de karmemora Brian O'Sullivan. Ĝi estis relative facila vojaĝo ĉar la kvanto estis malmulte laŭ komparo kaj lia vidvino Rita bone antaŭpakis ilin. EAB retenos kelkajn librojn el nia provizo kiujn ili ankoraŭ ne havas en sia kolekto kaj la aliajn ili vendos per komputilo. Oni informas min ke la Asocio bone profitas el tio.

Geoffrey Wood

KAJ POST LA POSTSKRIBO . . . daŭrigata sur paĝo 4

Recenzo

Marvirinstrato de Tim Westover. 208 paĝoj. €10,80 + impostoj k.t.p ĉe U.E.A. £4.95 ĉe Amazon + senpaga ekspedo se vi elspezas pli ol £10. £6.12 ĉe Wordery + senpaga ekspedo. Por senpage elŝuti la novelaron , vizitu <http://marvirinstrato.com>.

Kiam mi eklernis Esperanton, mi legis multajn librojn pri ĉiuj temoj. Kelkaj tiaj libroj ege interesis min, kelkaj tute male. Kelkaj, verdire, estis enuigaj, kaj unu, mi ĉiam memoros ĝin, enhavis tiom da gramatikaj eraroj, ke mi multloke trovis ĝin nekomprenebla. Fakte, mi pensis, en momento de krueleco, ke oni povus oferti tiun verkon kiel ia konkurso "lokigu la erarojn"; oni povus elekti paĝon tute hazarde. Post tiuj tagoj plenaj de entuziasmo, mi malplie legis Esperanton. Mi pli konsciis, ke la tempo fuĝas, kaj mi ne plu volonte legas tedaĵojn nur pro tio, ke mi sentas ian devon aŭ finlegi malinteresan verkon aŭ eklegi klasikaĵon. Anglalingve, mia fikcia legado plejparte konsistas el detektiv-romanoj, kaj teologio rolas kiel ĉeftemo en mia nefikcia legado. Kompreneble, troviĝas detektiv-romanoj Esperantaj. Mi jam legis plurajn verkojn kaj originalajn kaj tradukitajn. Mi aparte menciis la tradukojn de *Maigret* verkitajn de Daniel Luez, kiuj provizas la Esperantistaron per tiaj leĝeraj legindaĵoj, kiuj ofte mankas al ni. Tamen, mi devas konfesi, ke tiuj tradukitaĵoj, bone kaj bele presitaj, ne instigis min plu legi en angla traduko la ceterajn romanojn, ĉar, verdire, mi trovas tiujn verkojn malmodernaj, kaj aĥ - vivo mallongas.

Tamen, dirinte ĉion ĉi, mi diru ke aparta plezuriga ĝenro en Esperanto, miaopinie, esta la novelo. Troviĝas pluraj novelaroj kiuj komparas favore kun tiuj en aliaj lingvoj. Tre lastatempe mi aĉetis bonegan novelaron de Tim Westover, *Marvinstrato*. La rakontoj - entute dek ok - ekrigarde, temas pri nia mondo, kaj kelkaj ja ŝajnas preskaŭ eblaj en nia mondo sed ne tute eblaj. Tamen, pluraj el la rakontoj certe ne temas pri nia mondo. Imagu landon kie oni solvis la energiproblemon per lokigado de homaj animoj (post morto) en niajn ilojn por funkciigi tiujn. Tiu rakonto pritraktas la problemojn leviĝantajn post aĉeto de toastilo entenanta netaŭgan animon. (Malriĉuloj eĉ ne havas sufiĉe da mono por akiri animon.) Aliaj temoj estas ege diversaj; orfiŝeto kiu vojaĝas kun komerca karavano, bestĝardeno plena de mitologiaj bestoj, marvirinoj, komerco inter pigoj, parodibirdo kiu primokas homojn, mirinda fiŝhepatoleo kie magio problemigas la vivon de sia akiranto, imaga meduzeto kiun ĉiu povas vidi, lunulinoj. Plejparte troviĝas ia stranga kulmino en la rakontoj, kiu malfaciligas priskribadon de la temoj sen malkovrado de la intrigoj.

La noveloj ŝajnas esti paraboloj. Tamen, plejparte, la signifo de la parabolo ne estas evidenta. Tial, eble ili ne estas paraboloj sed strangaj rakontetoj pri iomete paralela universo. Se plaĉas al vi la konkrete ebla, eble tiu ĉi verko ne plaĉos al vi. Sed se plaĉas al vi la stranga kaj la alimonda aperantaj kiel la normala kaj la ĉiutaga, vi eble tre ŝatus tiun ĉi novelaron.

Angus Wilkinson

KAJ POST LA POSTSKRIBO *daŭrigata de paĝo 4*

ĉe eBay ni rikoltis (post subtraho por afranko kaj kostoj uzi la retan vend- kaj pagservojn) pli-malpli £2,000 en la lastaj 12 monatoj. Nia kutima maniero vendi brokantajn librojn ĉe la kongreso aŭ al homoj vizitantaj la oficejon havigis al ni nur £162 en tiu sama jaro. Jen granda diferenco!

Kaj eĉ kompare al nia vendoj de novaj varoj tio imponas. Kvankam la enspezo ĉi-kaze estas pli, ni devas subtrahi la kostojn por la libroj kiam ni unue aĉetis ilin. La fina rezulto estas ~£1300, do eBay ja donas al ni profiton, multe pli ol niaj tradiciaj manieroj. Kaj egale, ĝi ebligas al ni meti la librojn en la manojn de homoj, kiuj deziras legi ilin, sed alie ne havos la okazon. Niajn librojn ĉe eBay eblas kontroli mem ĉe espinfo.org/eBay.

Tim Owen

(5)

Recepto:

KUKURBA PEKLAĴO

Britaj ĝardenistoj konkuras inter si por kreskigi la plej grandan verdan kukurbon. Mia recepto celas tian, sed taŭgas por ia ajn kukurbo.



Bezonatas:

- 500g da kukurbo
- 100g da zingibra radiko
- 2 servokuleroj da salo
- 1 deserta kulero (10ml) da kukumo
- 1 tekulereto da kapsiketo en polvo
- 1 servokuleroj da mustardsemoj
- 1 deserta kulero da *garam masala**
- 4 servokuleroj da bruna sukero
- 3 servokuleroj da vinagro
- Suko de 1 citrono

Senŝeligu kukurbon, tranĉu en kubojn. Miksu en pelvo kun la tranĉita zingibro. Surŝutetu salon, kurkumon, kapsiketan polvon, mustardsemojn kaj *garam masala*. Miksu ĉion bone.

Solvu sukeron en vinagro kaj citronsuko kaj boligu dum kelkaj minutoj. Verŝu la likvon sur la kukurbon. Miksu denove kaj metu en bokalojn. Lasu en varma loko dum kelkaj tagoj. La peklaĵo eĉ pli bongustas post pluraj monatoj.

* Abundas receptoj por tiu spicmiksaĵo el Barato. Inter la plej simplaj estas miksaĵo de komino, kariofilo kaj kardamomo samkvante, ĉiuj en polvo.

Jack Warren

EVENTOJ

- Novembro 5 Federacia kunveno,
York - vidu supre
- Decembro 15 NOEF-renkontiĝo,
Manĉestro
- 2017
- Majo 19-21 Brita/ Kongreso,
Edinburgo

Por pli da informoj pri tiuj eventoj iru al la EAB-retejo - aŭ kontaktu la redaktoron.

FEDERACIA KUNVENO EN YORK

La aŭtuna kunveno okazos je **sabato la 5a de novembro 2016**, je **13 30** ĉe la klubo Guppy's Enterprise Club, 17 Nunnery Lane, York. Estos aĉetebraj manĝetoj kaj trinkaĵoj, aŭ kunportu varman trinkaĵon.

TAGORDO

- 13 30 Bonvenigo
- Pardonpetoj
- Protokolo kaj akcepto
- Aferoj leviĝantaj
- Venontaj kunvenoj
- Blanka Rozo*
- Aliaj aferoj
- Konversacia rondo*
- 16 30 Fino

*inkluzive de ludoj - kun premietoj!

PRI MURIEL SHACKLETON

Kelkaj legantoj jam aŭdis la malĝojan novaĵon pri Muriel Shackleton el Bradford, kiu grave malsaniĝis en aŭgusto kaj enhospitaliĝis.

Intertempe ŝi sufiĉe stabiliĝis por translokiĝi al flegejo ne longe for de ŝia domo. Ŝia filino Mary petis min plusendi tiun leteron.

"Mia patrino Muriel ŝajne bone fartas nuntempe. Ŝi petis min sciigi vin, ke ŝi alte taksas viajn pensojn kaj bondezirojn, kaj ke vi ne forgesis ŝin. Ŝi estas tre kontenta, ke ankaŭ vi memoras kaj alte taksas la bonajn tempojn kune ĝuataj.

Ŝi loĝas ĉe Ryecroft House, Knowles Court Nursing Home, 2 Bridgeway, Knowles Lane, Bradford BD4 9SN. Ni aparte dankas al tiuj sinjorinoj el la distrikto, kiuj faras vizitojn tie.
Muriel kaj Mary."

CITAĴO EL LA FERVOJA MUZEO, YORK

"Katojn kaj hundojn oni uzis en varejoj por kapti ratojn. Ĉe la GWR (Granda Okci-denta Fervojo) kato ricevis kiel salajro duonlitron da lakto ĉiusemajne."

Sproto

Vortrado

E A
O V
D
O L
M R

Uzu la literojn en tiu rado por fari vortojn kun finaĵoj *-o* aŭ *-a*.
Ĉiu vorto devas esti almenaŭ trilitera kaj enhavi la literon
meze de la rado. Uzu ĉiun radikon nur unufoje. Propraj nomoj
estas malpermesataj. Litero povas aperi plurfoje en unu vorto.
Eblas fari almenaŭ 22 vortoj.

Beletraj Anagramoj

Uzu tiujn anagramojn por deĉifri la nomojn de dek bone konataj verkistoj en Esperanto.
Ĉiu nomo konsistas el antaŭnomo kaj familia nomo, kaj aperas en la antologio
Star in a Night Sky de Paul Gubbins.

1. SONJA SNETNOHS

6. DRIPO NELUCA

.....

.....

2. TOBJANO LERRUIMO

7. GRENJO EFA

.....

.....

3. GRANDLOR SNUBARSA

8. HOGME CARAJOC

.....

.....

4. TERESO TRISTO

9. DIDRE HANSEL

.....

.....

5. GROBO HEDLITERA

10. JELET KROSBI

.....

.....

Solve por krucvortenigmo en numero 274

Horizontale: 8. alterna 9. idolo 10. orfeo 11. bariton' 12. ikso 13. pordisto
16. obelisko 19. iras 22. kalumni' 23. armad' 24. aksel' 25. monarka

Vertikale: 1. rabotilo 2. stufas 3. bruoj 4. ĉambro 5. tigrido 6. fontas
7. forn' 14. obsidian' 15. ŝirmilo 17. enlasi 18. kriema 20. rimark'
21. Marno 22. klan'

Solve por enigma poemo en numero 274: lokomotivo

La Blanka Rozo estas la revuo de la Federacio Esperantista de Jorkŝiro. Ĝi aperas trifoje jare: jarabono £6.00. **Redaktoro:** Jack Warren, 11 Linden Grove, Linthorpe, Middlesbrough TS5 5NF. Tel. 01642-82 76 79, rete: p.warren47@hotmail.co.uk. **Federacia Prezidanto:** Jack Warren. **Protokola Sekretario:** Gillian Cartledge, 175 Hunter House Road, Sheffield S11 8TZ. **Kasisto:** Angus Wilkinson, 59 Cross Hills Lane, Selby YO8 4RU. Tel. 01757 210375, rete: angus.wilkinson@sky.com.

